**PILO-PRESS**
Internacia
Informservo

Aliĝu al la
Eŭropa Esperanto-
Kongreso en
Eindhoven
Paskon 1976
***************

**Eldonanto/Herausgeber:**
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg
Tel. (0911) 463649; 514269



N-ro 10/1976 - 4 marto 1976
Aperas ĉiusemajne

Ĉefministro Kühn en la Honora Komitato

Düsseldorf (pp) - La ĉefministro de la germana federacia lando Nordrhein-Westfalen (Nordrejn-Vestfalio), Heinz Kühn, per letero de la 76-02-20 al la vicprezidanto de GEA, Hermann Heiß, deklaris sin preta aliĝi al la Honora Komitato de la komuna kongreso de la landaj Esperanto-asocioj de Belgio, Nederlando kaj Federacia Respubliko Germanio.

La kongreso okazos paske 1976 en Eindhoven.

*****************

Grava informo el Svislando

Berno (pp) - D-ro Artur Baur anoncis lunde, la 1-an de marto, en la Esperanto-elsendo de Svisa Kurtonda Servo, ke la Esperanto-elsendoj de tiu stacio ek de la somera programo 1976, t.e. ek de majo 1976 estos disaŭdigata sesfoje en la semajno. Temas pri la du elsendoj, parolitaj de d-ro A. Baur resp. de ges-roj Gacond, kiuj estonte estos ripetataj dufoje anstataŭ unufoje.

La elsendoj okazos tagmeze je 13,20 horo (MET) lunde, merkrede kaj vendrede kaj vespere je la 22,35 horo (MET) (do 10 minutojn pli frue ol nun) marde, ĵaŭde kaj sabate.

Detalojn la radiostacio disaŭdigos dum aprilo.

Tamen bonvolu noti, ke ĝis majo la Esperanto-elsendoj okazos kiel ĝis nun lunde kaj merkrede, je la 13,20 horo kaj ĵaŭde kaj sabate, je la 22,45 horo sur ondoj 31,46 m, 48,66 m, 75,28 m

Adreso: Svisa Kurtonda Servo, Esperanto, CH-3000 Bern 16, Svislando

****************

Mortis Kolomano Kalocsay

Budapeŝto (pp) - Antaŭ redakta fino ni telefone eksciis el la Esperanto-Centro Paderborn, ke vendrede, la 27-an de februaro 1976, en Budapeŝto mortis Kolomano Kalocsay en la aĝo de 85 jaroj.

D-ro med. K. Kalocsay, kuracisto, esperantisto ek de 1913, estis la unuaranga Esperanto-verkisto, speciale li elstaris kiel tradukinto de beletra literaturo. Dum du peridoj Kalocsay estis la ĉefredaktoro de Literatura Mondo. Sed ankaŭ sur la lingva-teoria kampo li postlasis siajn spurojn, speciale kiel kunverkinto de Plena Gramatiko de Esperanto. Kune kun Julio Baghy li estis la famiĝinta "Hungara Duopo".

La homo Kalocsay mortis, sed lia verkaro pluefikos! En Enciklopedio de Esperanto oni legas: "Alta, facilgesta viro, kun moviĝemaj manoj kaj tre karakteriza kapo: longa, ĝuama nazo, profundaj brunaj okuloj, alta nuda frunto, kaj ĉio substrekita de la ironia, iom diabla ridstreĉo de la lipoj." Tiele li restos en nia memoro!

## Trajn-Radiofonio

Bremen (pp) - La 10-an de marto, je la 20-a horo, parolos Heinz Dieter Hartig pri "Trajn-Radiofonio kaj sekurec-instalaĵoj ĉe lokomotivoj" en Bremen, Unterrichtsraum, Kantine Bundesbahn-Betriebswerk Bremen Hbf, Findorffstr. 13. Libroekspozicio informas pri la Esperanto-Literaturo.

## Esperanto kaj Populara Muziko

Trenčín (pp) - De la 23-a ĝis la 26-a de aprilo 1976 okazos en Trenčín, Ĉeĥoslovakio, internacia seminario pri "Esperanto kaj Populara (POP) Muziko." En ĝia kadro okazos prelegoj kun diskutoj kaj prezentadoj de ensembloj, kantistoj kaj muzikistoj en- kaj eksterlandaj. La laborlingvo estas Esperanto.

Informojn donas: Z K Merina, CS-911 01 Trenčín, Ĉeĥoslovakio.

## Novaĵo el Paderborn

Paderborn (pp) - En Paderborn (FRG), kiu daŭre famiĝas pro kibernetikaj esploroj ligitaj al Esperanto, dank' al kiuj kibernetikistoj en nova prilumo rigardas la Internacian Lingvon, Esperanto antaŭ nelonge akiris novan pozicion: kiel prezidanto de la Paderborna Sekcio de Liberala Demokratia Partio estis novelektita prof. Lothar M. Weeser-Krell (46), esperantisto ekde 1947.

S-ro Weeser-Krell estas fakulo por vendad-ekonomio en la Universitato de Paderborn. Estante aktiva esperantisto (li gvidis la gazetaran servon ĉe la 43-a UK en Mainz, 1958), li momente vicprezidas la Eŭropan Klubon. Li estas konata ankaŭ kiel aŭtoro de libro pri varbado kaj de premiita teatraĵo kies enhavo same tuŝas tiun modernan fenomenon.

Ĉi-somere s-ro Weeser-Krell estas vicdekano de la Ekonomia kaj Jura Falkultato enkadre de Internaciaj Someraj Universitataj Semajnoj en Primoŝteno, kie li gvidos seminarieton "Varbado kaj Lingvolimoj".

La nova honorigo de prof. Weeser-Krell kontribuas al plifirmigo de Esperanto en la medio de Liberala Demokratia Partio en FRG.

## Pri Aŭstralio

Vieno (pp) - Hodiaŭ ni citas el la dua parto de la prelego de s-ro Vokal en la Esperanto-elsendoj el Vieno pri lia vojaĝo al Australio:

"En Aŭstralio mi konstatis ke la enmigrintoj el multaj nacioj harmonie kaj pace kunvivas; kaj per ilia laboro utilas al la nova hejmlando......Veturante de Melburno 1000 km per aŭtomobilo al Sidnejo mi pensis rezulte de konversacio pri la vasta regiono, ke Aŭstralio povas ankoraŭ al multaj homoj ebligi bonan estontecon, precipe en la kamparanaj landpartoj.

Rilate al la lingva problemo: La radiostacioj aranĝas por la diversaj lingvogrupoj specialajn programojn kun ilia hejmlanda muziko kaj diversaj raportoj en iliaj idiomoj. Mi mem estis intervjuita en la germanlingva horo de la Melburna Radiostacio pri la Esperantokongresoj. La disaŭdigo okazis dum la silvestra vespero....
Per aŭtomobilo gvidis s-ano Volo Gueltling s-inon Elfriede Ernst kaj min trans Canberra al Sidnejo. En Canberra ni vizitis la parlamenton kaj la grandan bibliotekan domon. Dum la postkongreso en Sidnejo ni povis admiri la gigantan, modernan operejon...Vespere en la familia domo de gesamideanoj Matasin kunvenis 54 esperantistoj, kiuj estis abunde regalataj. En la Sidneja Esperanto-Domo s-anino E. Ernst prezentis diapozitivprelegon pri Bruselo. Mi parolis pri Esperanto en Aŭstrio, pri la Esperanto-elsendoj kaj mi montris diapozitivojn sub la titolo "Promenado tra Vieno"......"

## Esperanto en radio

Vieno. El la semajna komentario de d-ro Alfred Macher ni citas: "Certe, la aŭstrianoj amas intense muzikon, facilan vivmanieron kaj belaĵojn ĉiuspecajn. Sed ili ankaŭ l a b o r a s intense, kiel pruvas la ekonomia situacio, multe pli bona ĉe ni ol ĉe la plej multaj el la aliaj industri-ŝtatoj.

Ne ĉie en la mondo tion oni scias. Elstara observanto el eksterlando iam diris: La aŭstroj laboras tre diligente kaj intense, sed ili ne parolas pri tio, kvazaŭ ĝi estus hontinda.

Ne, ni ne hontas ke ni ankaŭ bone laboras, sed ni fakte preferas paroli pri ĉio, kio plibeligas la vivon. La rezulto restas ĉiukaze la sama."

Dum la pasinta semajno Radio Vieno ricevis 18 alskribojn de esperantistoj el 9 landoj. El la leterkesto ni eksciis, ke aperis la unua numero de la gazeto "Horizonto", redaktita de s-ino Inês Gastôn.

Zagrebo. En la lasta elsendo de februaro Zagrebo respondis al korespondantoj kaj priparolis ricevitajn periodaĵojn.

Romo. Pri la semajno de internacia amikeco Radio Romo komentis: "La 'Semajno de Internacia Amikeco', kies oka eldono okazas de la 23-a ĝis la 29-a de februaro 1976, estas jam ĝentila tradicio en Esperantujo; kaj tradicioj ne devus bezoni atentigojn, ĉar ili vivas per si mem. Tamen,estas oportune memorigi la okazon, kiun la semajno proponas, superi per amikeca gesto tiujn neglataĵojn, kiuj kelkfoje ĝenas la rilatojn inter homoj ankaŭ apartenantaj al la sama medio, inkluzive de la rilatoj inter esperantistoj.

Ke ĉi tiu semajno de amikeco "trans limoj" estu, antaŭ ĉio, stimulo al amikeco kaj lojaleco interne de la limoj, ne nur naciaj, sed precipe movadaj: jen nia sincera bondeziro."

Varsovio. La leterkesto pli kaj pli fariĝas la plej interesa programero en Esperanto-elsendoj de Pola Radio, tio denove pruvis la lastaj du eldonoj. Okazas vigla dialogo inter la redakcio kaj aŭskultantoj, kaj ofte ankaŭ dialogo inter aŭskultantoj. Oni sentas, ke aŭskultantoj vere okupas sin pri la temoj de la elsendoj kaj ke la elsendoj estas ilia "propra afero", kiun oni devas flegi kaj kreskigi.

Speciale interesa estas la statistika materialo, kiun la redakcio prezentas. Statistiko nur valoras, se ĝi baziĝas je sufiĉe altaj nombroj kaj rilate al la Varsoviaj korespondaĵoj oni jam povas paroli pri altaj nombroj. Dum januaro kaj februaro la Esperanto-Redakcio de Varsovio ricevis 1 095 korespondaĵojn.

La statistiko laŭ landoj montras jenan rezulton. Dum januaro kaj februaro venis korespondaĵoj el jenaj landoj:

| | | | |
|---|---|---|---|
| Sovetunio | 344 | Ĉeĥoslovakio | 146 |
| FR Germanio | 123 | Germana Demokratia Respubliko | 123 |
| Hungario | 58 | Britio | 55 |
| Finnlando | 55 | Francio | 37 |
| Italio | 25 | Nederlando | 24 |

Je la statistika pinto laŭ personoj staras ges-roj Trude kaj Paul Thomas el GDR, kiuj skribis dum la du monatoj 91 korespondaĵojn. Aliaj aŭskultantoj sendis inter 88 kaj 8 leterojn kaj poŝtkartojn. La fakto, ke el Sovetunio venis 344 korespondaĵoj, denove substrekas la sperton, ke en tiu lando vere estas granda intereso por Esperanto. Kaj ke el ambaŭ germanaj ŝtatoj venis po 123 korespondaĵoj, tio certe ne estas nur hazardo, sed ankaŭ la merito de du aŭskultantoj, kiuj skribis 91 resp. 80 korespondaĵojn.

Kalinke iras tra la urbo....

...kaj diras: "Vivu Esperanto!" Kalinke, la moviĝema, energia rentulo el Recklinghausen, interparolis jam kun multaj Paderbornanoj. Ĉiam denove li revenas al Paderborn, al la Esperanto-Centro en la Riemekestr. 62, por antaŭenigi tie la informan laboron.

Nuntempe Kalinke iras tra la Paderbornaj stratoj kiel "sandviĉa viro" kun grandegaj afiŝoj sur brusto kaj dorso. Kaj la sloganon sur la afiŝoj "Esperanto-Hauptstadt Paderborn - in Europa immer vorn!" (Paderborn, ĉefurbo Esperanta - en Eŭropo ĉiam sur avana loko) li mem produktis. "Kaj tiele restu!",Kalinke opinias.

Kaj li konfesas: "Al mi 66-jarulo oni povas diri ĉion! Mi nenion vendas, kaj mi ne kolektas subskribojn. Mi tutsimple volas kolekti simpation por Esperanto, la plej racia solvo de la lingva problemo."

Kaj al ĉiu, kiu volas konatiĝi kun Esperanto, Kalinke transdonas karton, kuponon por senpaga Esperanto-instruprogramo, kiun oni povas ricevi senpage de la Esperanto-Centro.

Kalinke rekomendas: "Kiu ne volas fari multajn vortojn, nur diru 'Vivu Esperanto' kaj li ankaŭ ricevas la kuponon...."

Tiele okazas en Paderborn, kaj Pilo-Press opinias: "Vivu Esperanto kaj vivu Kalinke!"

**************

La mirinda vivo de la malriĉa d-ro Lazaro

Minden (pp) - Richard Schulz, la aŭtoro de la poŝlibro "Mein geliebtes Esperanto", kiu aperos post kelkaj semajnoj, faris prelegon pri la vivo de d-ro Zamenhof sub la titolo "La mirinda vivo de d-ro Lazaro", ĵaŭde, la 19-an de februaro, antaŭ la"societo de kristana-juda kunlaboro" en Minden.

La prelego vekis eĥon ankaŭ en la loka gazetaro, kiu trifoje raportis. "Neue Westfälische" de la 76-02-21 skribas i.a., ke la vespero fariĝis travivaĵo, ke la prelego vekis la deziron aŭdi pli multe, enpenetri pli profunden en la materion, scii kaj kompreni ĉion.

**************

Vana amokanto

Knabo diris al amikino
vespere sub la stratolampo
"Mi amas vin, belega sinjorino!
Kiel moskito ĉirkaŭ lampo
Mi flugos ĉirkaŭ vin, trezoro,
nun kaj en ĉiu horo!"
Ŝi diris post lia amokanto:
"Flugu, mi petas, ĝis la venk' de Esperanto!"

Reinhold Meier

**************

Radio Bervalio respondas

Demando: Ĉu Esperanto estas planlingvo?

Respondo: Principe jes! Sed ne temas pri Esperanto, temas pri lingvo neniam finota! Kaj fakte ne temas pri lingvo, sed pri projekto!